

BRAZILA ESPERANTISTO

58-A JARO

MARTO-APRILIO 1964

N.º 600-601

XVIII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO FORTALEZA — CEARÁ



La bonega *Ceará Coral Vila-Lobos* sub la kompetenta gvidado de la muzikmajstro Prof. Antonio Gondim de Lima kantas la himnon de la Kongreso en la Inaŭgura Solena Kunsido.

MARTO-APRIL 1964

58-a Jaro

N.º 600-601

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande: 15 steloj aŭ 10

respondukuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1964

(De acordo com os Estatutos todos os
membros são automaticamente filiados à
organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantista"	1.500,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o anteceden- te e mais o Anuário do movimen- to esperantista	4.000,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	8.000,00
Membro Mantenedor: recebe o mes- mo que o Membro Assinante ..	12.000,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	80.000,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	160.000,00
Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à	

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º

Rio de Janeiro, GB

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Balancete referente ao ano de 1963

RECEITA

Saldo de 1963	86,00
Assinaturas	137.343,00
Comissões	71.595,00
Congressos	15.250,00
Contribuições	1.136.490,00
Cursos	134.853,00
Diversas Receitas	38.841,00
Donativos	5.850,00
Donativos a UEA	1.400,00
Fundo de Edições	107.020,00
Instalação	25.000,00
Serviço de Livros	1.299.592,00
Revista	25.750,00
Subvenção Estadual 1963 ..	100.000,00

3.099.070,00

DESPESA

Apogantoj	7.000,00
Assinaturas	61.352,00
Biblioteca	61.400,00
Comissões	62.965,00
Congressos	52.750,00
Cursos	25.580,00
Despesas da Sede	156.235,00
Diversas Despesas	56.344,00

Donativos a UEA	3.150,00
Franquia	58.247,00
Fundo de Edições	185.250,00
Informações	152.438,00
Instalações	69.519,00
Serviço de Livros	724.905,00
Material de Expediente ..	115.249,00
Móveis	30.000,00
Quotas UEA	748.820,00
Revista	244.236,00
Serviço de Secretaria	283.500,00
Saldo para 1964	130,00

3.099.070,00

Rio de Janeiro, 2 de Janeiro de 1964.

IRANI BAGGI DE ARAÚJO

Tesoureira

O FUNDO DE EDIÇÕES acaba de pu-
blicar a notável obra póstuma de Couto
Fernandes.

ESPERANTA-PORTUGALA PROVER-
BARO

ADAGIARIO ESPERANTO-PORTUGUÊS

AMO PER PROVERBOJ

AMOR POR ANEXINS

Cr\$ 1.200,00

BRAZILA ESPERANTISTO

58-A JARO

MARTO-APRILLO 1964

N.º 600-601

XVIII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

GRAVA ATINGO — LA REKTORO DE LA UNIVERSITATO DE CEARÁ KREAS ESPERANTO-INSTITUTON

Nia XVIII-a Brazilia Kongreso, kiu venigis la esperantistaron al Fortaleza, ĉefurbo de ŝtato Ceará, okupis la periodon de la 12-a ĝis la 19-a de Januaro lasta per viglaj aktivecoj, kiuj estis plensukcesaj. La granda laboro de la Organiza Komitato estis bone rekompensita kaj tute kontentigis la kongresanojn alkurintajn el la plej diversaj lokoj de la lando. Venis karavanoj el Rio Grande do Sul post veturo de ĉirkaŭ 5.000 kilometroj, el Pernambuko, el Baía, el Rio de Janeiro, el Guanabara, el Piauí. Venis unuopaj esperantistoj el Pará, el Paraná, el Goiás, el Brasília. Aviadiloj, ŝipoj kaj omnibusoj transportis esperantistojn al la lando de la lumo. La Kongreso prezentis ĝustan ideon pri nia Movado en Brazilo. Ni akcentu, ke la etoso estis konstante kora kaj amika. La Internacia Lingvo estis ĉiam aŭdata en ĉiuj laborkunsidoj kaj en la konversacio de la esperantistaj grupoj.

MESO

En la mateno de la unua tago de la Kongreso, la 12-a de Januaro, je la 8-a, esperantistoj katolikaj kaj nekatolikaj plenigis la belan modernan preĝejon de la Koro de Jesuo por aŭdi la meson, unuan solenon de la Kongreso. Faris la meson nia samideano Frato Carlos de

Arary, kapuceno. Pastro Bruno Ostropolski el Argentino, predikis en Esperanto pri la alta signifo de la Lingvo donacita al la Homaro de la genia Zamenhof.

INTERKONATIGA KUNVENO

Poste, je la 10-a, en CEU (Clube dos Estudantes Universitários-Klubo de la Universitataj Studentoj) la kongresanoj renkontiĝis por ricevi paperujon kun emblemo de la Kongreso, detalaj programoj kaj aliaj dokumentoj. Tiu renkontiĝo estis aparte agrabla: multaj amikoj ĝoje sin revidis unu la alian kaj novaj amikoj fariĝis.

PREPARA KUNSIDO

Je la 15-a, en la aŭlo de la Fakultato de Dentkuracarto de la Universitato de Ceará, okazis la kunsido destinita al la elekto de la Estraro. Prof. Paulo Amorim Cardoso, Prezidanto de la Organiza Komitato, malfermis la kunsidon kaj anoncis la tagordon. La kongresanoj tiam elektis per akklamado la Estraron de la Kongreso: Prezidanto — D-ro Carlos de Almeida Wutke, Uberlândia MG; 1-a Vicprezidanto — Prof. D-ro Hernani Dias Correa, Porto Alegre; 2-a Vicprezidanto — S-ro José Inácio Pessoa de Andrade, Recife; 3-a Vicprezidanto — D-ro Joaquim do Couto, Niterói; 4-a Vicprezidanto — Prof. Hans Mabesoone, Nederlando kaj Recife; Ĝenerala Sekretario — S-ro José Dutra Mendes, Fortaleza; 1-a Sekretariino — Prof-ino Valdina Magalhães Caymmi, Salvador; 2-a Sekretario — S-ro José Geraldo de Oliveira, Fortaleza.



Interno de la vasta moderna preĝejo de la Koro de Jesuo — Kongresanoj de diversaj religioj ĉeestas meson.

La Prezidanto de la Kongreso laŭ la Regularo nomis jenajn komisionojn: Komisiono pri Tezoj — Kap. Godofredo de Araújo Gois, Salvador, Pastro Olavo Coimbra, Recife kaj S-ro Paulo Vieira da Silva, Brasília; Komisiono pri Proponoj — S-ro Helmuth Schenk, São Paulo, S-ro Antônio de Pádua Soares, Picos PI kaj Renato Lemos Diniz, Veadeiros GO; Komisiono pri Redakto — S-ro Hermes de Deus Pitta, Salvador. S-ro Vivaldo Marcelino da Silva, Campos RJ, kaj S-ro Benedito Lopes, Recife; Komisiono pri Informado — S-ro Carlos Henrique Dionísio, São Leopoldo RS, S-ro Armindo Trarbach, Cachoeira do Sul RS, kaj F-ino Mércia Leite Bezerra, Fortaleza.

SOLENA MALFERMA KUNSIDO

La Kongreso estis solene inaŭgurita je la 20-a en la aŭlo de la Jura Fakultato de la Universitato de Ceará, kiu estis plena de kongresanoj kaj de personoj de la urbo. Sur la podio sidigis Prof. D-ro Antônio Martins Filho, Rektoro de la Universitato, Prof. D-ro José Lins de Albuquerque, reprezentanto de la ŝtatestro Kolonelo Virgílio Távora, Prof. D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, Prof. D-ro Francisco Fausto Albuquerque, oficiala oratoro, Pastro Bruno Ostropolski, Generalo Antonio Leite Filho, Prezidanto de

“Nia Hejmo”, Kolonelo Olegário Memória, Direktoro de Instituto São Paulo, Prof. D-ro Ernani Dias Correa, D-ro Joaquim do Couto, Prof. Paulo Amorim Cardoso, Prezidanto de la Organiza Komitato kaj S-ro José Dutra Mendes.

La Prezidanto de la Kongreso malfermis la kunsidon, kaj Ceará Coral Vila Lobos direktata de la kompetenta muzikmajstro Antonio Gondim de Lima, bele kantis la Himnon de la Kongreso kun vortoj de Pierre Luz kaj muziko de la sama majstro. Varmaj aplaŭdoj salutis la bonegan kantistaron.

La Generala Sekretario legis la ricevitajn salutleterojn, kaj poste estis aŭdita la kongresaj salutvortoj de la Prezidanto de BEL. La Oficiala Parolanto de la Kongreso, Prof. Francisco Fausto de Albuquerque, elokvente parolis pri Esperanto, pri ĝia deveno kaj progreso. La reprezentanto de Stato Piauí, S-ro Antonio Paula Soares, salutis en la nomo de la esperantistoj de tiu Stato kaj ankaŭ legis saluton de la Prezidanto de Esperantista Asocio de Rio Grande do Norte. En la nomo de la ŝtatestro Prof. D-ro José Lins de Albuquerque, ŝtata Sekretario de Trafiko kaj Publikaj Laboroj esprimis bonvenon al la kongresanoj kaj, kiel esperantisto, finis sian saluton en Esperanto. S-ro Paulo Amorim Cardoso legis saluton de la ŝtatestro de São Paulo, D-ro Ademar de Barros.



La Prezidanto de BEL, Prof. D-ro Carlos Domingues, inter la katalikaj pastroj, kiuj partoprenis en la Kongreso, — de dekstre, samideanoj Fr. Carlos de Arary, el Fortaleza, Pastro Bruno Ostropolski, el Argentino, kaj Pastro Olavo Coimbra el Recife.

La Prezidanto de la Kongreso prezentis al la publiko la du alilandajn samideanojn, kiuj partoprenis la Kongreson, Pastro Bruno Ostropolski el Argentino kaj Prof. Hans Mabesoone, nederlandano: la ĉeestantaro vigle salutis ilin per aplaŭdoj.

Kun emocio oni aŭdis la saluton registritan sur magnetofono de S-ro Pierre Luz, la aŭtoro de la vortoj de la himno de la Kongreso. Enlitiginta pro malsano li ne povis ĉeesti.

Venis tiam grava parto de la kunsido, kiam la rektoro de la Universitato Prof. D-ro Antonio Martins Filho, akcentante la konatan pionirecan karakteron de Ceará, anoncis, ke li kreas Esperantokurson en la Universitato, similan al la kursoj jam ekzistantaj de aliaj vivantaj lingvoj. La ĉeestantaro entuziasme ricevis la gravan anoncon kaj kore gratulis kaj dankis la Rektoron per longa aplaŭdado.

La brila kunsido finiĝis per la kantaĵo de la Nacia Himno fare de Ceará Corral Vila Lobos.

LABORKUNSIDOJ

La prokramo difinis 6 laborkunsidojn en la tagoj 13 (1), 14(1), 16(2), 17(2). Ili estis preziditaj ĉu de D-ro C. A. Wutke, ĉu de Prof. Mabesoone. En la komenco de la unua kunsido la Prezidanto D-ro Wutke, komunikis, ke ne estis prezentitaj tezoj. Konsiderante tion, S-ro Elmuth Schenk proponis, ke la Kongreso studu la gravajn temojn prezentitajn de la Organiza Komitato en sia

Unua Cirkulero. La propono estis aprobita kaj la Prezidanto invitis al la diskutado la kongresanojn interesigantajn pri la diversaj aferoj.

Profesoro Mabesoone traktis pri la temo "Neceseco kaj ebleco de okazigo de Universala Kongreso en Brazilo". Li plene konsentis pri la ideo kaj prezentis praktikan solvon, kiu estis aprobita. La Kongreso elektis specialan komisionon konsistantan el samideanoj Carlos Domingues, Rio de Janeiro, Hernani Corrêa, Pôrto Alegre, Ilse Jalowski, São Paulo, Paulo Vieira, Brasília, Joaquim do Couto, Niterói, C. A. Wutke, Uberlândia kaj H. Mabesoone, Recife, kiu siavice nomis la lastan por kunordigi la necesajn paŝojn, inklusive ĉe UEA.

En alia kunsido Pastro Olavo Coimbra, el la Salezia Kongregacio de Dom Bosco faris trafan prelegon pri la pozicio de Esperanto en la Leĝo pri Direktlinioj kaj Bazoj de la Nacia Edukado. La Prezidanto Wutke petis de la preleginto, ke li skribu siajn utilajn klarigojn por diskonigo ĉe la brazilaj esperantistoj.

Estis aprobitaj propono de Pastro Barros Leal S. J. pri intima kunlaborado inter radiamatoroj kaj esperantistoj, kaj propono de S-ro Gert Druker pri ekzistado de fakdelegito pri turismo en ĉiu grupo.

La Kongreso aprobis dankesprimojn al ĉiuj, kiuj iamaniere helpis al la organizado kaj ankaŭ gratulesprimon al Ruga Kruco pro la jarcentfesto de tiu bonfara institucio, kiu ĉiam kunlaboris kun la Esperanto Movado.



Solena Malferma Kunsido - La podio en aŭlo de la Jura Fakultato - La Prezidanto de la Kongreso, D-ro C. A. Wutke parolas por deklari la inaŭguron.

VIZITO AL LA AŬTORITATULOJ

La 13-a, posttagmeze, la kongresanaro estis afable akceptita en la Stata Parlamento, en la Komunuma Parlamento kaj en la Urbestrejo.

En la unua faris saluton Prof. Paulo Amorim Cardoso kaj respondis la prezidanto, deputito D-ro Mauro Benevides; en la dua parolis D-ro Joaquim do Couto kaj dankis Konsilanto José Edmar Barros de Oliveira.

La Urbestro Generalo Murilo Borges, estis salutita de nia samideano Godofredo de Araújo Góis, kiu memorigis iliajn amikajn rilatojn de la tempo, kiam ambaŭ sin preparis por la milita kariero. La Urbestro dankis kaj asertis, ke li plenumos la peton de la Kongreso pri restarigo de strato Esperanto en la Urbo. Komisionoj de Kongresanoj vizitis la ŝtatestron kaj la ĉefepiskopon.



La Rektoro, Prof. D-ro Antônio Martins Filho, parolas en la Solena Malferma Kunsido kaj anoncas la kreadon de Esperanto-Instituto en la Universitato de Ceará.

FOKLORA PREZENTADO

Vespere okazis en granda korto de la Klubo de la Universitataj Studentoj (CEU) interesa foklora prezentado. La regiona ludo "Bumba meu boi" kun kuriozaj dancoj kaj kantoj tre plaĉis al la rigardantoj. La ĉeestantaro aplaudis dum la prezentado kaj en la fino la ludantoj estis salutitaj de pluraj kongresanoj.

VIZITO AL LA ĈEFURBO

Pluraj omnibusoj portis la kongresanojn en la 14-a matene tra la bela ĉe-



Grupo de kongresanoj en la mateno de la tago, kiam la Kongreso komenciĝis.

furbo, kiu havas 700.000 loĝantojn. Fortaleza estas urbo kun rektaj paralelaj stratoj, kiuj donas al la tuto ĉarman aspekton. Multaj altaj konstruaĵoj jam ekzistas sed la stratoj restas mallargaj, kiel konvenas al tropikaj urboj. La vizito etendiĝis al la vidindaj antaŭurboj. Oni haltis en Mecejana ĉe la domo de la fama verkisto José de Alencar: lia romano la *Vidvineto* jam aperis en Esperanto kaj lia ĉefverko la *Gvarano* estas anoncita por publikigo. La vizitintoj lasis siajn impresojn en la koncerna libro.

ARTFESTO

Vespere la kongresanoj ĉeestis allogan artfeston en la aŭditorio de radistacio — Rádio Assunção, kie Ceará Coral Vila Lobos, sub la direktado de la muzikmajstro Antônio Gondim kaj Kurso Pastro Antônio Tomaz prezentis kantaĵojn kaj deklamaĵojn, kiuj plene plaĉis.

MARBANO ĈE PLAĜO FUTURO

Fortaleza estas fama pro siaj marbordoj kaj ofte oni kantas "ĝiajn verdajn sovaĝajn marojn". Tiel kun plezuro oni veturis en la mateno de la 15-a al la plaĝo "Futuro" unu el la plej ŝataj. La veturado de 16 kilometroj kondukis la vizitantojn preter aliaj plaĝoj — Iracema, Mucuripe, kun ravanta vidaĵo. Ĉe la fino de la ekskurso multaj kongresanoj sin jetis en la maron por freŝiga bano.

AKCEPTO ĈE NAŬTICO

La eleganta kaj riĉa sociala klubo Náutico, kiu estas konata en la tuta

lando pro sia imponeco kaj lukso, malfermis siajn vastajn salonojn por ĝentile akcepti la kongresanojn en la vespero. La akcepto faris memorigan impreson.

KUNVENO POR FRAMASONOJ KAJ SPIRITISTOJ

Framasonoj kunvenis en la 16-a vespere speciale por akcepti la framasojn kongresanojn. Ankaŭ la spiritistoj okzigris kunvenon kun ĉeesto de multaj kongresanoj. Tiaj renkontigoj de sampensantaj fariĝis notinda tradicio en niaj Kongresoj universalaj, landaj aŭ regionaj.

KINA PREZENTADO

Du filmoj estis prezentitaj posttagmeze en la 17-a: unu pri Ameriko kaj la alia "Jen Aŭstralio", parolanta en Esperanto. La prezentado okazis en United States Information Service.

TELEVIDA PREZENTADO

La TV Ceará, kanalo 2, prezentis en du vesperoj programojn en kiuj espe-



Post la marbano en plaĝo Futuro kongresanoj haltas ĉe plaĝo Mucuripe kaj ĉirkaŭas maljunan harditan flosiston apud lia flosa.

rantistoj estis intervjuitaj. Inter aliaj parolis D-ro Carlos Domingues, Prof. Mabesoone kaj Prof. Paulo Amorim Cardoso. Tiuj programoj, estis viditaj de granda parto de la loĝantaro de la regiono kaj tial fariĝis grava informo pri Esperanto kaj pri nia Movado.

VIZITO AL "NIA HEJMO"

Feliĉa okazaĵo en la Kongreso estis la vizito la 18-an posttagmeze al "Nia Hejmo", institucio de helpo al la infanaro, direktata de Generalo Alfredo Leite Filho kaj edzino. "Nia Hejmo" gastigas kaj edukas kelkajn dekojn da ĝeinfanoj. La institucio okupas grandegan terenon kun pluraj domoj, bele aranĝitaj. La kongresanoj, kunigintaj en la vasta biblioteko, aŭdis klarigojn pri la laboro de "Nia Hejmo" kaj poste oni inaŭguris la portreton de Zamenhof en tiu salono; la Prezidanto de BEL malfermis la bildon



Domo de José de Alencar, en Messejana, vizitita de la kongresanoj.

kovritan per flago. Fine la vizitantoj, dividitaj en grupoj vidis detale la diversajn partojn de la domo kaj gratulis la gastigantojn.

AKCEPTO ĈE ÍCARO

Ícaro, reputaciata oficiala klubo, akceptis la kongresanojn en la vespero de la 18-a. Tie oni prezentis denove laŭ peto de multaj personoj la filmon "Jen Aŭstralio" kaj oni aŭdis dum pli ol unu horo la regionajn kantadistojn Antônio Ferreira kaj Vicente Granjeiro, kiuj estas famaj pro sia admirinda kapablo de improvizo. En siaj versaĵoj ili ofte aludis al iuj kongresanoj.

PIKNIKO

La mateno kaj posttagmezo de dimanĉo, la 19-a estis rezervitaj por ĝojiga pikniko en Maranguape, proksima urbo, kiu estas la naskiĝloko de la granda historiisto Capistrano de Abreu. Akceptitaj de D-ro Jorge Couto en sia komforta bieno Sankta Georgo, la kongresanoj sin banis en kaskado kaj en natura naĝejo kaj fine estis regalitaj per tagmanĝo.

FERMA SOLENA KUNSIDO

En tiu tago, je la 20-a efektiviĝis la ferma kunsido en Rádio Assunção. kiun prezidis D-ro C. A. Wutke. Ĉe lia dekstro sidis la reprezentanto de la Urbestro Generalo Murilo Borges. En la komenco estis legita la nomojn de la mortintoj depost la lasta kongreso, kaj la ĉeestantaro, honore al ili, ŝtariĝis kaj silentis dum minuto. Jenaj personoj paroladis: S-ro Armindo Trarbach, S-ro Antônio de Pádua Soares, F-ino Vivaldina Caymmi, kaj S-ro Paulo Vieira da Silva. La Prezidanto metis la Esperantan emblemon sur la bruston de Prof. Antônio Gondim aludante al aliaj grandaj servoj al la Kongreso; S-ro Gondim dankis kortuŝita. D-ro Wutke disdonis la diplomojn al la kandidatoj, kiuj faris ekzamenon dum la Kongreso.

La reprezentanto de la Urbestro faris la gravan komunikon, ke la Urbestro ĵus sin turnis al la Urba Konsilantaro, laŭ sia promeso, kun peto, ke la nomo de la strato Jaçanã ŝanĝu al Esperanto. La komuniko estis salutita de la kongresanaro per fortaj aplaŭdoj.

La Prezidanto en la nomo de Uberlândia Esperanto-Klubo proponis por la



En la Ferma Kunsido Prof. J. Mabešone legas la Rezolucion de la Kongreso pri okzigo de projektata Universala Kongreso en Brazilo.



Dum iuj sin banas en la verda malkvieta maro ĉe plaĝo Futuro, aliaj sur la bordo manĝas la dolĉegajn ciriguelas.

venonta Kongreso la urbon Uberlândia, Minas Gerais, kaj faris inviton de tiu societo. La ĉeestantaro aplaŭdis la proponon, kiu laŭ la Statuto de BEL estos submetita al ties decido.

Ceará Coral Vila Lobos, kiu kantis en la komenco de la kunsido, kantis en la fino la nacian himnon kaj la esperantan kun akompano de S-ro Odilon Odílio da Silva, Limoeiro do Norte, ĉe la piano.

Kun koraj salutoj kaj amikaj adiaŭoj finiĝas nia XVIII-a por de nun vivi en la memoro de siaj partoprenintoj.

TAGMANGO ĈE ROTARY CLUB

Al la tagmango ĉe Rotary Club en la 16-a estis specialaj invititoj la Prezidanto kaj la Kasistino de BEL. Ĉeestis ankaŭ nia samieano S-ro Armindo Trarbach, rotariano el Cachoeira do Sul. La vasta manĝosalono de Palace Hotel estis plene. La Prezidanto de la klubo, S-ro Francisco Juracy Teixeira salutis la kongresantajn esperantistojn kaj donacis al la estraranoj de B.E.L. belajn flagetojn el silko. D-ro Carlos Domingues, dankante prezentis resume la ideon de Esperanto kaj ties pozicion en la mondo.

EKZAMENOJ

Dum la Kongreso funkciis ekzamenkomisiono de B.E.L., kiu ekzamenis jenajn kandidatojn: al Profesora Diplo-

mo — Paulo Amorim Cardoso, Fortaleza, kaj Carlos de Almeida Wutke, Uberlândia MG; al Supera Diploma — Antônio de Pádua Soares, Picos PI, Armin-do Trarbach, Cochoeira do Sul RS, Paulo Vieira da Silva, Brasília, kaj Vivaldo Marcelino da Silva, Campos RJ. La kandidatoj estis aprobitaj. La ekzamenkomisio konsistis el S-ro José Dutra Mendes, Prof. D-ro Carlos Domingues kaj F-ino Irani Baggi de Araújo.



La Reprezentanto de la Urbestro enmangas Diplomon al S-ro Vivaldo Marcelino da Silva en la Solena Ferma Kunsido. Sur la tablo oni vidas la oficialan leteron de la Urbestro al la Urba Konsilantaro kun peto por strato Esperanto.

ESPERANTO-KURSO EN LA UNIVERSITATO DE CEARÁ

En la mateno de la 20-a vizitis la Rektoron de la Universitato komisiono konsistanta el Prof. D-ro Carlos Domingues, F-ino Irani Baggi de Araújo, D-ro Joaquim do Couto kaj Prof. Paulo Amorim Cardoso, kiu traktis pri la organizota Esperanto-Kurso, promesita de Prof. D-ro Antônio Martins Filho en la malferma kunsido. La Prezidanto de B.E.L. certigis la Rektoron pri plena kunlaboro. La Kurso, gvidota de Prof. Paulo Amorim Cardoso, komenciĝos jam en la kuranta jaro.

PRELEGO PRI FONETIKO

London, la 20-an, posttagmeze, Prof. D-ro Carlos Domingues, kiu estas fakulo pri Fonetiko, faris prelegon al kelkdekoj da samideanoj pri Kompara Fonetiko de Esperanto kaj de la portugala

la lingvo parolata en Brazilo. La preleginto reliefigis kelkajn punktojn, en kiuj brazilanoj povas havi dubon, kaj respondis plurajn demandojn de la aŭdintoj.

GENTILA DONACO

La konata firmo Suerdieck S/A el Baía, fabrikisto de plej ŝatataj cigaroj, pere de F-ino Vivaldina de Magalhães Caymmi, kaj en la nomo de Esperanto-Asocio de Baía, donacis al ĉiu kongresano elegantan skatoleton kun tiuj cigaroj. Sendube ĝojiga memorigaĵo.

RUBANDO SUPER STRATOJ

De unu flanko al la alia de kelkaj stratoj oni vidis grandajn rubandojn kun saluto al la Kongreso. Ilin metis pluraj komercaj firmoj, kiaj *Casa Tôres*, *Cooperativa Suburbana de Consumo*, *Mário Kaŭla*, *Cia. Editora Nacional*, *Tipografia Aragão* kaj *Livraria Assunção*.

EKSPOZICIO

En la grava firmo Rouvanni Esporte ce centra strato Barão do Rio Branco, 1079 la Organiza Komitato aranĝis belan Esperantan ekspozicion, kiu bone



Parto de la ĉeestantaro en la solena Ferma Kunsido.

impresis la multajn rigardantojn pro la libroj prezentitaj el diversaj devenoj. *Kurso de Esperanto em 20 Lições* presita de Instituto Benjamin Constant en Braje por blinduloj vekis ĝeneralan atenton.

VIZITO AL LA AŬTORO DE LA HIMNO

La Kongreso, per Prof. D-ro Carlos Domingues, F-ino Irani Baggi de Araújo, Prof. Paulo Amorim Cardoso, Prof. Antônio Gondim de Lima, D-ro Honor Tôrres kaj S-ino Angélica Tôrres, vizitis la talentan aŭtoron de la Himno de la Kongreso. La poeto, S-ro Pierre Luz, kiu estis malsana en la lito, dankis la viziton, precipe ĉar oni aŭdigis per magnetofono lian himnon.

VESPERMANGO

Laŭ formita tradicio la Prezidanto de B.E.L. invitis al vespermango la membrojn de la Organiza Komitato kaj edzinojn. La vespermango okazis en la luksa hotelo San Pedro kaj ĝin partoprenis 16 personoj, inter kiuj la Rektoro Prof. D-ro Antônio Martins Filho. La gastoj estis akceptitaj de la estraranoj Prof. D-ro Carlos Domingues kaj F-ino Irani Baggi de Araújo.

En la Kongreso enskribigis 202 samideanoj distribuitaj jene: Amazonas 1, Piauí 4, Ceará 61, Rio Grande do Norte 13, Pernambuco 12, Alagoas 2, Baía 9, Minas Gerais 21, Rio de Janeiro 17, Guanabara 13, São Paulo 22, Paraná 4, Rio Grande do Sul 16, Goiás 2, Federacia Distrikto 5. La multaj, kiuj ĉeestis, ĝuis plej agrablajn semajnon.

Tiu estis la plej norda tutlanda Kongreso en Brazilo. Ĉiutage estis nedaŭra pluvo, kiu mildigis la klimaton tropikan. La ĉarmoj de la urbo, la afableco de la loĝantoj, la regionaj fruktoj de la sezono, inter kiuj la sovaĝeta tre bongusta *ciriguêla*, cio larĝe kompensis la vojaĝon.

Estas aparte menciinda la eksterordinara sindono de la membroj de la O.K., niaj ŝatataj samideanoj D-ro Honor Tôrres kaj S-ino Angélica Tôrres, kiuj inkluzive gastigis ĝentile en sia hejmo plurajn kongresanojn.

La verda standardo estis tie tre alte tenita dum tagoj plenaj de bonkoreco, regitaj de la "interna ideo".

BEL vige klopodas, por ke el ĉiu Kongreso restu io daŭra kaj altsignifa. Nia XVIII-a tute atingis tiun celon per la starigo de konstanta Esperanto-Kurso en la Universitato de Ceará, kio estas salutinda kiel pionira venko.

NEKROLOGO



MIGUEL TIMPONI

Mortis la 13-an de februaro, en Belo Horizonte, D-ro Miguel Ângelo Timponi. La mortinto, klera advokato kaj politikisto, naskiĝis en Juiz de Fora la 27-an de septembro 1893.

Li diplomigis pri Juro en Rio de Janeiro kaj komencis profesii la advokatecon en Muriaé. En 1923 li revenis al Rio de Janeiro, kie li sin dediĉis al sia profesio, ĉiam brile. Li estis prezidanto de la Ordeno de la Advokatoj, Sekretario de Internaj Aferoj kaj Sekureco, Sekretario de Edukado kaj Kulturo.

El multaj aferoj, kiujn li defendis, estas citinda tiu, kiun gajnis Federação Espírita Brasileira, pri kiu li publikigis verkon (O Caso Humberto de Campos).

Politike, li multe helpis la organizon de kelkaj partioj. Kvankam havante grandan kulturon, li estis modesta homo. Al siaj filoj li ne postlasis riĉaĵojn, sed honestan nomon kaj estimon de siaj amikoj. Li estis vidvo kaj lasis 6 gefilojn kaj 18 genepojn.

RECENZO

Marcel Pagnol — TOPAZE; Charles Vildrac — LA SÍPEGO TENACITY — El la franca trad. Roger Bernard — STAFETO J. Régulo, Eldonisto 1960 — 22,5cm x 15cm — 292 paĝoj — Prezo ĉe BEL: CR\$ 4.200,00.

Ŝajne ia bacilo trapenetris la organismon de la eldonisto J. Régulo kaj tie prilaboras ian "malsanon", kiu lasas lin malkvieta, aktiva, en konstanta kaj viva moviĝado. En nenia tempo, ni konis pri la ekzisto de tiel impeta eldonado: eĉ dum la glora periodo de la esperantaj eldonadoj de Hachette, kiel nun reliefigas en La Laguna. Por ne flankenŝovi ian el siaj projektoj, Juan Régulo planis la samtempan eldonadon de pluraj serioj en la fama kolekto "Stafeto": Beletraj Kajeroj, Popularscienco, Belliteraturo, k. t. p.

La nuna libro, enhavanta du malnovajn francajn teatraĵojn, nome *Topaze* kaj *La Sípego Tenacity*, aperas kiel la dek-sepa volumo de la Bel-Literatura Eldon-Serio Febre kaj konscie la "eldonisto de la esperantistoj" daŭrigas la disvastigadon de rimarkindaj teatroverkoj, ĉu originale verkitaĵ, ĉu tradukitaĵ. Ĉi tiuokaze, li kunhelpas en la diskonigado de tiaj verkoj, kiujn, pro hazardo aŭ neokazo de furoro, ne estas konataj de fremdaj popoloj en ilia lingvo. Tiu estas la celo de nia komuna lingvo kaj unu el la kialoj de ĝia sukceso.

Li estis entuziasma por Esperanto, tradukis Esperanten brazilan rakonton kaj verk's komedion en tiu lingvo. Dank'al li Brazilo havis du sinsekvajn superecojn en la jaraj konkursoj de U.E.A.

Pro lia iniciato B.E.L. kreis la Konkursan inter gimnazianoj. Dum jaroj li ageme prezidis B.K.E. kaj plenumis dum unu periodo la oficon de Komitatano de U.E.A.

La estraroj de B.E.L. kaj de B.K.E. akompanis al la tombejo nian neforgeseblan amikon kaj ankaŭ ĉeestis la funebran meson. Brazila Esperantisto sincere kondolencas la familion.

Pagnol kaj *Vildrac* donas al si la manojn en tiu volumo, eble pro tio ke la dramo *La Sípego Tenacity* estas malgranda (malgraŭ tio ke ĝi estas triakta), rilate al la alia, ampleksanta pli aŭ malpli tri kvaronojn de la tuta foliaro. Aŭ eble pro tio ke ambaŭ iom similas unu la alian laŭ politika vidpunkto: *Pagnol* surpaŝas la vojon esence politika, skizante la putrigintan karakteron de la socio miksiginta kun la malvirtoj de la politikado. Lia verko ne prezentas solvon nek entenas ian ajn konkludon pri moralo, ĝi lasas en la leganto aŭ spektanto la impreson ke la afero ne estis tute elsprucigita, ke estas ankoraŭ multe da puraĵo saviĝota de la koto. Tamen, *Pagnol* preferis ne fini la historion almenaŭ kontentige. Oni naŭzas pro tiom da cinika malhonestajo kaj restas fine kun la impresoj ke la malbono triumfas sur la bono, la malvirto pli valoras ol la vorto. Kaj, spite de ĉio tio, la situacioj estas lerte kaj malpeze prilaboritaj, kaj la dramo fine ŝajnas komedio aŭ satiro. Kiu ajn estas ĝia literatureca valoro ĝi certe distras.

Vildrac, pli serioza ol sia vibra najbaro, ankaŭ priskribas suprajn aspekton de la alia flanko de la vivo, kian ludas ĉiuj senescepte *Vildrac* sukcesis, en rapida dramo, ne nur prezenti la personojn, sed ankaŭ ilin movigi, paroligi kaj pensigi. Liaj kreitaĵoj agas simple, laŭ la ĝenerala koncepto pri pravo kaj malpravo. Iom kaŝe, implice, la verkisto elvidigas sian opinion pri la rilatantaj aferoj prezentante la juĝojn, kiuj ne estas en la unua teatraĵo.

Roger Bernard vestis ambaŭ ilin per lerta traduko, ĉar li saĝe ĉirkaŭpasis ĉiujn obstaklojn literaturecajn de sia nacia lingvo. Fidelaj al la Vero kaj al la graveco de nia tasko, ni devas rimarkigi, tamen, ke li tie kaj tie forgesis sin liberigi de la originalo kaj ne elektis la taŭgajn esprimojn por la kompreno de internacia publiko. Tiel, lia traduko fakte lamas, ĉe tiaj esprimoj: "... ĉampano estas unu aĵo, kaj la vino alia aĵo ...", "... sen rigardi ...", "... sen lasi sian laboron ...", "... senflati min ...", "... Tereza ne leviĝis (ellitigis) ...", k. t. p. Tamen, kiel dirite, li solvis la plej malfacilajn problemojn kaj prezentis majstran tradukon, fluan, konvinkan, elegantan kaj teatrekan.

LA BLUA BANTO

Romaneca novelo de

JÚLIA LOPES DE ALMEIDA

Daŭrigo

IV

La feliĉo estas vere kompatindaĵo, asertis en la vizitoĉambro d-ro Sergio Bastos, montrante sprite iom da maliceto en sia buŝo je mallargaj lipoj. Pro lia bonega memoro venis al lia kapo, ke la tempo, en kiu li vivis en ĝojo kaj plezuro, okazigis sekvan periodon de apatio kaj seninteresiĝo pri ĉio, kio ne estus motivo por tiu ĝuo tute propra, tute intima. La feliĉo estas senfrukta kiel la dezerto.

Izidoro brue ridis, kaj ne konsideris serioza la paradoksan teorion de sia amiko. Ŝajnis nekredeble, ke en sia aĝo, lia amiko ankoraŭ kreu similajn fantaziojn! Efektive, ĉiu konsideras la feliĉon laŭ sia temperamento. Sed en sia menso li neniam povus imagi tian strangan difinon. Kredeble Sergio ŝatis pli belsonajn frazojn ol sincerecon, kiel en la antaŭa knaba tempo.

D-ro Bastos daŭrigis:

— Ni formas koncepton de la feliĉo preskaŭ ĉiam en malakordo kun nia vivmaniero. Mia patro, entreprenema homo por negocoj malsimplaj, kiuj trudis al li aktivecon kreskantan, senripozan, certigis ke por li la feliĉo estus ombro de arbo! Algluita al la urbo pro siaj nombraj entreprenoj, li neniam regalis sin per kampara ripozado. Li malamis rubojn, tegmentojn, murojn, revis pri vastaj kampoj, kie li povus plene spiri, enlasante en la pulmojn puran aeron, en la ombraĵo cirkle etendita ĉirkaŭ lia amata arbo. Malŝatante la urbon, la rutinon, la disciplinon k. c., li tamen konsultis multenombrajn domojn en pluraj kvartaloj, faris tegolojn kaj brikojn, liveris vivrimedojn al amaso da laboristoj, helpis la urban plibonigon, prestigis la komercadon, kaj mortis kun la idealo, kiun li ne havis tempon realigi — nek donus al li la esperatan konsolon... Kial ĉi tiu viro riĉigis? Ĉar ne konsiderante sin feliĉa, li urĝe bezonis trovi la feliĉon. Li laboris intensege,

streĉis siajn fortojn, antaŭen puŝis la vivon, dezirante atingi la revatan ombron de la arbo... Homoj sen idealo estas parazitoj en la mondo. La feliĉo estas io, kion oni ne atingas, post kio oni kuras kaj pro kio oni mortas...

En la fundo de sia konscio, s-ino Angelika diris al si mem:

— Vortoj, nur vortoj! La feliĉo estas vidi la edzon kontenta kaj la filinojn feliĉaj...

Kaj ŝi demandis, iom maltrankvile: — Por s-ro Raul, kio estas la feliĉo?

D-ro Sergio intervenis, dum la filo kaj Lucila interŝanĝis aman rigardon kaj rideton:

— Por mia Raul, nun la sola feliĉo estas la geedziĝo; la fazoj de amo estas egalaj por ĉiuj... Post ioma tempo, kiam estos starigita la familio kaj trankvila la ĝermo de liaj aspiroj, kiu determinis la elekton de lia kariero, aperigos alian idealon...

— Panjo! panjo!

S-ino Angelika levigis subite. Tio estis la voĉo de Magdalena, afliktita voĉo venanta de la silenta interno de la domo.

Antaŭ ol Izidoro, mirigita, akompanis sian edzinon, jam malaperanta en la koridoro, Raul jetis sin al la pordo. Sed lia patro, per energia, rapida movo, kaptis lian brakon kaj ekkriis: — Haltu!

Lucila ankaŭ kuregis, akompanante la gepatrojn.

Neatendite la du viroj trovigis solaj kaj rigardadis unu la alian, vizaĝo kontraŭ vizaĝo. La okuloj de unu serĉis la fundon de la animo de la alia, muta.

En certaj okazoj, vizaĝaj esprimoj montras pli bone la penson ol la plej ĝustaj vortoj. Raul estis tremanta, korporemita.

— Kiĝ okazis?

— Io ajn, kio ne koncernas vin. Via fiancino estas Lucila.

Ili apenaŭ aŭdis sonojn kiel mallaŭtigitan ploron malprecize distingeblan, kvazaŭ bruon de akvo interne de akvedukto...

— Ne forgesu, ke vi devos kune vivi la tutan vivon! flustris Sergio, metante karese la manon sur la ŝultron de sia filo.

— Mi estas forta.

— Mi timas...

— Kion?!

— Ho!

— Estas ankoraŭ tempo rezigni...

— Ne.

D-ro Sergio silentis. Post kelkaj momentoj, Izidoro reaperis en la vizitoĉambro, kun ĝeneca rideto.

— Nenio grava; ektimo, nur eta ektimo. Magdalena volis per propraj manoj pretigi infuzajon, sentante sin malsaneta... la flamo de gasbeko komunikigis al la punktoj de ŝia maniko... la fajro estis tuj estingita... feliĉe, ne okazis brulvundo... tro nerva, tiu knabino!... La patrino restis tie, por trankviligi ŝin. Oni ne zorgu plu pri tio... Kaj nun oni profitu la okazon esti la tri viroj solaj, por kombini la lastajn pretigaĵojn por la geedziĝo... Ĉu vi prizorgis la kaleŝon? Koncerne min, ĉio estas preta. Mi jam parolis al la edziĝa ĵugisto kaj al la pastro...

Lucila reaperis, tre pala, kun ĝeneca, timema mieno de ŝanceliga konscio. Ŝi sidigis ĉe angulo kaj fiksas la rigardon sur la florornamajoj de la tapiŝo. Ŝi ne volis doni ian ajn opinion. Ŝi pensis: ekzistas en ŝia hejmo sekretoj, kiujn la fianĉo devas neniam ekscii, kaj ŝi estas la plej interesata kaŝi kaj ignori... Kion ŝi vidis, antaŭ momentoj? Ŝia fratino akre riproĉegis ilian patrinon, ĉar tiu ĉi elverŝis flakonon, kiu enhavis korodan acidon. Kial? Ĉar Magdalena amas la saman viron kiel ŝi, estas jaluza kaj volis mortigi ŝin. Ĉu pro tio ŝi devus rezigni la edzinigon? Eble rilate ŝian familion, tio estus ŝia devo, sed rilate la fianĉon? La destino elektis ŝin, do ŝi devos obei al la destino. Se ŝi definitive forlasus tiun feliĉon, kiu logas ŝin, ŝia fratino ne havus profiton el tio. Ĉe la ebleco cedi la fianĉon al Magdalena, evidente ĉi tiu estus ankaŭ devigata rezigni. La vivo estas hazardo. La hazardo favoris ŝin; la alia rezignaciis pri sia sorto... Pro la ĉagreno kaŭzita al ŝia fratino, ŝi ne povos ĝui perfektan ĝojon, ŝia pasio vivos subpremita de konscienciproĉo. Sed la egoismo estas pli forta... Ŝi sentas tion, kaj defendos ĝin ĝis la morto!

Trad. C. C.
(daŭrigota)

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

MATENA MOVIGADO

Cornelio Penna

Matene blovadis tra la stratoj varmeta vento, venanta, oni ne sciis, el kie, kaj ne sukcesanta disbati la nebulon, kiu dum la nokto falis sur la urbon. La lumo venis malrapide, el la leviĝejo de la suno, kaj rampadis sur la montoj, eble tial, ke ĝi ne povis venki la grandan blankan, nepalpeblan kaj densan mason, kiu faris ĉion neklara kaj malpreciza, disperdiĝinta en nuancojn, en opalecajn rebrilojn. Sur la neregulforma placo, kontraŭ la malnova preĝejo de la Rozario, oni ne sukcesis vidi la transan flankon, kaj la silento estis peza, densa.

Subite la sonoriloj argente eksonoris. Unue vibra kaj hela sono, kiun tuj sekvis pli profundaj sonoroj en malkrescenda gamo, kvazaŭ invito al la lumo, al la lumaj horoj de la tago, kies matenruĝo jam malfruigis. Post kelke da minutoj reaŭdigis la sonora signalo, kaj la triangula placo ekbolis. Kelke da fenestroj ekknaris kaj malfermiĝis, kaj ĉe la pordoj de kelke da domoj ekaperis mallumaj figuroj, kiuj ekrapidis al la templo konfuze gestadante, ĉar ankoraŭ survoje ili finadis la preparojn kaj alĝustigadis la vestojn, nur tiam surmetatajn.

P. C. N.

EDIÇÕES BRASILEIRAS

Curso de Esperanto em 20 Lições	300,00
Método Elementar de Esperanto-	
-Pastorino	500,00
Karlo	200,00

Eis, em Esperanto, a tradução do trecho do romance 'Repouso', publicado no número passado.

PRECONCEITOS MAIS FREQUENTES CONTRA O ESPERANTO

Temos a satisfação de publicar as respostas que recebemos ao Concurso instituído em nosso número de Abril-Junho de 1962.

Os autores dessas respostas, classificados em igualdade de condições e aos quais felicitamos muito cordialmente, receberam como prêmio a obra RUI BARBOSA — Biografia Eseo, de Fernando Nery, magistralmente traduzida por Jozefo Joels.

DO ENG.^o ELMO PEREIRA NUNES,
SÃO PAULO SP :

É com grande prazer que passo a apresentar as minhas respostas às objeções apresentadas contra o Esperanto, principalmente agora que o Inglês faz novas investidas no sentido de ser considerado língua universal.

1.^o) Sim, a formação de uma língua é o resultado de um processo milenar natural de evolução. Por isso, uma língua artificial que utiliza o que de melhor existe em todas as línguas somente pode ter sucesso. A falência do Volapük se deveu ao fato de não querer aproveitar radicais já existentes e de universalidade comprovada.

3.^o) A melhor resposta a esta objeção é a apresentação de um vocabulário técnico em Esperanto. Nenhum idioma tem a facilidade do Esperanto de adotar o melhor termo estrangeiro e "esperantizá-lo".

4.^o) Sem dúvida é muito grande o número de pessoas que compreendem o Inglês mas ninguém pode dizer em sua consciência que todas as melhores obras estejam divulgadas em Inglês. O técnico de hoje tem que ser um verdadeiro poliglota. Na minha profissão, por exemplo, há inúmeros trabalhos em russo sobre máquinas elétricas que não posso consultar. Com uma única divulgação em Esperanto de seus trabalhos técnicos e científicos pode cada nação servir ao mundo inteiro.

6.^o) O Esperanto não quer substituir a língua nacional e isto é uma vantagem como se expõe no item 9.

7.^o) O fato de que o Esperanto ainda não é utilizado em encontros interna-

cionais (exceto os de esperantista) não significa que não tenha caráter prático. É fácil imaginar uma assembléia da O.N.U. sem as complicações dos inúmeros intérpretes, sem os atrasos das traduções, sem a imprecisão com que as noções se transmitem de uma para outra língua.

Se ainda o número de esperantistas é pequeno isto se deve à falta de sua oficialização, à falta de maior propaganda, à existência de adversários ferrenhos (nem sempre honestos em seu combate).

8.^o) A Interlíngua apresenta muitas das vantagens do Esperanto mas tem ortografia difícil e é imediatamente compreendida apenas pelos conhecedores das línguas latinas e anglo saxônicas.

Sem dúvida é estranho para nós latinos o plural em *j* mas chamá-lo de anticientífico é condenar o russo e o próprio grego, que têm plurais terminados em *i*. Será mais anticientífica a formação de plurais na maioria das línguas naturais, como em inglês: *stone, stones, church, churches, quiz, quizzes, duty, duties, cargo, cargoes, beef, beeves, tooth, teeth, and so forth...*

9.^o) O fato de o Esperanto não pretender substituir a língua materna afasta o perigo de se diferenciar em dialetos. Este perigo existe apenas com referência à tribo africana que o usa como língua de uso cotidiano. Quando o esperantista usa o Esperanto tem o cuidado de respeitar-lhe as regras.

O mesmo não podemos dizer das línguas naturais. Já na presente altura os ingleses, por exemplo, se queixam das gírias e neologismos americanos. Que dizer daqui a alguns séculos? Talvez o Inglês padronizado viesse a ser tão estranho para os ingleses quanto o é o Latim para nós.

10.^o) Sem dúvida o Esperanto é mais fácil para os que dominam as línguas neolatinas, um pouco menos para os de língua anglo saxônica, menos ainda para os que falam os idiomas eslavos, e assim por diante. Mas este defeito é inevitável. Uma língua internacional deve ter o que de melhor há em cada idioma. Assim pensou Zamenhof ao criar o Esperanto. Mesmo quem fala

uma língua aglutinante ou monossilábica reconhecerá com prazer certos radicais e certas construções que lhe são familiares. Acaso podemos dizer o mesmo do Inglês e da Interlíngua?

11.^o) Condenar o veículo das idéias em lugar de condenar o cérebro que as criou é a mesma coisa que condenar o aparelho de rádio, de T.V., ou o papel usado na impressão do jornal. A valer este argumento deveríamos também condenar as línguas nacionais porque delas também se valem os agitadores.

DO PROF. WALTER AUGUSTO FRANCINI, SÃO PAULO SP:

1. A formação de uma língua é o resultado de um processo milenar natural no seio de um povo. Uma língua artificial não pode ser viva.

Contestação:

Realmente, "a formação de uma língua é o resultado de um processo milenar natural no seio de um povo."

O Esperanto não contradiz esta verdade, pois os elementos que o compõem (gramática e vocabulário) são naturais, ou seja, representam a escolha do que há de melhor em todas as línguas naturais. Esta escolha é, portanto, o único artificialismo do Esperanto, pois os fatos lingüísticos em que se baseia esta língua internacional são colhidos da realidade e representam sempre o que há de mais claro, direto, simples e objetivo, em matéria de linguagem. Esta síntese do melhor ocorre, pois, sobre processos "milenarios", "no seio de um povo", o terrestre.

Quanto à segunda parte do preconceitos ("uma língua artificial não pode ser viva"), ela é francamente desmentida pelos fatos. Com efeito, se por língua viva entendermos a que é falada, — sem contarmos as pessoas que falam fluentemente o Esperanto entre si — lembraremos os programas de rádio locais ou estrangeiros, falados naquela língua; e os congressos nacionais e internacionais de Esperanto, em que este se torna a língua oficial dos mesmos. Se, porém, dermos à expressão "língua viva" o sentido mais amplo de instrumento atual de manifestação oral ou escrita do pensamento, então fácil será provar a existência de gran-

de número de jornais, revistas e livros, editados em Esperanto, constando estes últimos não apenas de traduções mas também de trabalhos originais que enriquecem o patrimônio cultural da humanidade.

2. O Esperanto serve talvez como código para o comércio, mas não é uma língua natural de cultura e por isso não pode exprimir matizes do pensamento e os sentimentos poéticos. O Esperanto não tem tradições literárias, nem literatura nem poetas.

Esclarecimento:

Este preconceito não tem base na realidade. Provam isto os fatos seguintes: 1) o catálogo de livros compráveis na Liga Brasileira de Esperanto, editado em julho de 1959, registra nada menos que 45 (quarenta e cinco) títulos de obras poéticas escritas em Esperanto, originais ou traduções; 2) a "Fundamenta Krebstomatologio", obra básica para o aprendizado do Esperanto, apresenta 144 (cento e quarenta e quatro) páginas de composições poéticas, num total de 460 (quatrocentos e sessenta) páginas de texto que compõem sua 16-a. edição, de 1939. Portanto, como se vê, a poesia ocupa 31,3% da obra citada.

O que se poderia alegar seria a relativa pobreza e ingenuidade das primeiras produções poéticas em Esperanto, mas isto ocorreu devido em parte a que a linguagem da poesia apenas se formava então e o próprio vocabulário comum da língua internacional era pequeno: 904 palavras, em 1887 (data do seu nascimento). Este número crescerá progressivamente, até que, em 1954, quando apareceu o Suplemento ao "Plena Vortaro", as palavras fundamentais e as oficiais somavam 4425 raízes — número mais que suficiente para exprimir "matizes do pensamento e os sentimentos poéticos". Este fato — e mais a harmonia da língua e a grande liberdade de composição de palavras pela junção de elementos já existentes, tornam o Esperanto a língua da poesia, por excelência.

Finalizando: Afirmar que "o Esperanto não tem tradições literárias, nem literatura nem poetas" é falsidade grossa porque justamente em sua obra básica, a citada "Fundamenta Krebstomatologio", existem, ao lado de composições

poéticas modestas, produções dignas de figurar numa antologia universal, como a "Prece sob o Estandarte Verde" e a tradução de um trecho do "Hamlet"; e porque três nomes fulguram no parnaso esperantista, tão grandes quanto os maiores de outras literaturas: ZAMENHOF, GRABOWSKI, KALOCSAY.

DA PROF.^a AUGUSTA M. J.
BOUGELET DE SOUZA, RESENDE RJ :

Lendo na revista "Brazila Esperantisto" a notícia a respeito do concurso aberto entre os leitores a propósito das objeções mais freqüentes contra o Esperanto, resolvi entrar na lice, respondendo ao quarto item.

Naquele item afirma-se que a língua inglesa é a verdadeira língua internacional, hoje empregada por todos, e que é utópico supor que o Esperanto possa de forma alguma concorrer com ela. Peço vênha para discordar dêsse ponto de vista.

Não contestarei que a língua inglesa seja hoje a mais empregada no mundo; mas a língua francesa também já o foi, direi mesmo que o foi muito mais, se compararmos os meios de difusão de que dispunha com os que estão agora a serviço da língua inglesa. No entanto, a despeito do admirável acervo de cultura, arte e ciência, a despeito da civilização requintada que representa, o francês é hoje considerado por muita gente língua morta, e nossos ginasianos desprezam seu estudo. Por quê? Por duas razões: a primeira sendo que as línguas nacionais padecem as vicissitudes das nações a que pertencem, e a derrota militar da França derribou o prestígio de sua língua; a segunda, que o poder econômico é hoje o fator mais importante nas relações internacionais. e o inglês é a língua falada pelo povo atualmente o mais rico do mundo. Isso, porém, não prova que essa língua possui os requisitos exigidos de uma língua internacional.

O inglês possui, é verdade, uma gramática relativamente simples; mas sua grafia é das mais complicadas, e freqüentemente divorciada de sua pronúncia. É uma língua em que, por um lado, um único símbolo representa até treze

sons (como é o caso da vogal "o"); e por outro lado, um mesmo som é representado de várias maneiras ("blue" rima com "shoe" e com "crew"). É uma língua que obriga o estudante — e não só ele — a recorrer ao dicionário ou a um professor para descobrir a pronúncia de cada palavra nova que encontra, pois não se pode basear na analogia com palavras já conhecidas. Entre mil exemplos, citarei apenas as palavras "through", "though" e "trough" tão parecidas na grafia, pronunciadas respectivamente: "sru", "zô" e "trof", (o "z" e o "s" pronunciados com a língua entre os dentes).

Como poderia uma língua sobrecarregada de tais dificuldades competir com o Esperanto, cuja ortografia representa fielmente a pronúncia, e cuja gramática é incomparavelmente mais simples ainda do que a gramática inglesa? Apenas têm faltado ao Esperanto os meios materiais para sua difusão; mesmo sendo assim, já é falado por milhões de pessoas espalhadas nos cinco continentes, e já possui uma vasta literatura, traduzida e original, abrangendo quase todas as atividades humanas. Pelo fato de não ser a língua de um povo e, por conseguinte, de não depender da sorte de nenhuma nação, o Esperanto é sem dúvida alguma a língua internacional do futuro e, quiçá, de um futuro mais próximo do que muitos pensam.

LASTHORE

XIX-a Brazila Kongreso de Esperanto

La Sekretariejo de Turismo de Stato Guanabara ĵus invitis Brazilian Esperanto-Ligon, por ke ĝi okazigu Esperanto-Kongreson en la kalendaro de la festoj memorigaj pri la 4-a Jarcento de Rio de Janeiro. Akceptinte la honorigan inviton, BEL decidis, ke la XIX-a Brazila Kongreso de Esperanto efektiviĝu en Rio de Janeiro en 1965. La Kongreso de Uberlândia realiĝos poste kaj estos do la XX-a.